
ESPERANTO HEARTBOOK

# ALL NATIONS GOSPEL PUBLISHERS




www.angp-hb.co.za

info@angp.co.za



# LA KORO DE LA HOMO

ESPERANTO

Download from www.angp-hb.co.za 

I

# LA KORO DE LA HOMO

aŭ

## La Spirita Spegulo de la Koro

(Alegoria Klarigado pere de Dek Bildoj)

--oOo--

Esperantigita de Ernesto Fénter (Ernst Venter)

Tiu ĉi libreto kune kun ties ilustraĵoj ekestiĝis en Francujo dum I732. ĝi nomiĝas la Spirita Spegulo de la Koro aŭ la Prikora Libro kaj pro ties profunda biblia vero kaj valoro estis kaj ankoraŭ estas disvastigata en preskaŭ ĉiu eŭropa lingvo kaj same en multaj afrikaj lingvoj, kaj estas legata de ĉiuj sociaj tavoloj kaj anoj de ĉiuj eklezioj.

Multaj jam spertis la veron de la dia promeso malnovtestamenta kiu estas plenumiĝinta en la nova, nome, "mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan mi metos en vin." (Jeĥezkel 36:26; Hebreoj 8:IO)

J. R. Gschwend

---

ALL NATIONS GOSPEL PUBLISHERS
P.O. Box 2191, Pretoria, 0001, R.S.A.

*(A Gospel Literature Mission financed by donations).*

"Ĉiu, kiu faras pekon, faras ion kontraŭ la leĝo; kaj peko estas kontraŭleĝeco.

Kaj vi scias, ke Li elmontriĝis por forigi pekojn; kaj peko ne estas en Li.

Ĉiu, kiu restas en Li, ne pekas; ĉiu pekanto Lin ne vidis, nek Lin konas.

Infanetoj, neniu vin forlogu; kiu faras justecon, tiu estas justa tiel same, kiel Li estas justa;

Kiu faras pekon, tiu estas el la diablo; ĉar la diablo pekas de la komenco. Pro tio la Filo de Dio elmontriĝis, por ke Li detruu la farojn de la diablo.

Ĉiu, kiu naskiĝis de Dio, ne faras pekon, ĉar li naskiĝis de Dio.

Jen kiel evidentiĝis la infanoj de Dio, kaj la infanoj de la diablo: ĉiu, kiu ne faras justecon, ne estas de Dio, nek tiu kiu ne amas sian fraton."

(I Johano 3 : 4-10)

Download from www.angp-hb.co.za 

## LA HOMA KORO

La dia templo aŭ la satana laborejo. (I Johano 3 : 4-I0)

---

Dum vi estos leganta tiun ĉi libron, bonvolu memoradi ke ĝi estas kvazaŭ spegulo en kio vi vidos vin mem. Ĉu vi estus idolano aŭ kristano, nekredulo aŭ forvaginto, vi rigardos vin mem kiel Dio vin vidas. Dio ne alrigardas la eksteran personon. Li enrigardas la homan koron.

Satano estas la patro de la mensogoj, la princo de la mallumo kaj la dio de tiu ĉi mondo. Li ŝajnigas sin anĝelo de la lumo por tiamaniere trompi la homaron. Nuntempe, same kiel pasintece, troviĝas multaj falsaj apostoloj kaj trompantoj kiuj ŝajnigas sin apostoloj de Kristo. Kaj ne estas mirinda ĉar Satano mem estas alivestita kiel anĝelo de la lumo (2 Korintanoj II : I3-I4). Satano, la dio de tiu ĉi mondo blindigas la homajn okulojn kaj mensojn por ke ili ne kapablu vidi ke Dio ilin amadas kaj ke Jesuo mortis por ilin savi. Ĉiuj pekuloj kaj nekreduloj estas mortaj kaj blindaj rilate al Dio. Ili estas regataj de la spirito de la dio de tiu ĉi mondo. (Efesanoj 2 : 2) Se iamaniere iliaj okuloj ne estas malfermataj rilate al sia perdita stato, ili estos survoje al eterna detruo. Tiu, kiu diras ke li estas sen peko, trompas sin mem. "Por tio la Filo de Dio elmontriĝis, por ke Li detruu la farojn de la diablo" (I Johano 3 : 8) "Submetiĝu do al Dio; sed rezistu la diablon, kaj li forkuros de vi. Alproksimiĝu al Dio kaj Li alproksimiĝos al vi" (Jakobo 4 : 7-8)

Dum vi legas tiun ĉi libron kaj pristudas ties bildojn, estos eble je vi vidi vian propran koron. Permesu al la

Download from www.angp-hb.co.za 

dia lumo montri al vi la staton de via koro. Konfesu viajn pekojn kaj ne neu ties ekzistadon ĉar la Dia Vorto deklaras ke "Se ni diras ke pekon ni ne havas, ni nin trompas kaj la vero ne estas en ni. Se ni konfesas niajn pekojn, Li estas fidela kaj justa por pardoni al ni niajn pekojn kaj nin purigi je ĉia maljusteco". (I Johano I : 8-IO)
"La sango de Jesuo, la Filo nin purigas de ĉia peko".
(I Johano I :7)

Vi estas regata aŭ de Satano aŭ de Dio; vi estas sklavo de la peko aŭ servisto de Dio. Se peko regas vian vivon, ne neu tion ĉi sed alkriu Dion. Li liberigos vin pere de Jesuo Kristo, Kiu venis al tiu ĉi mondo por savi pekulojn, por rompi la potencon de Satano kaj peko super ni. Li estas nia savo. Vi troviĝas en la ĉeesto de Sankta Dio, kiu vidas ĉiujn la sekretojn, la kaŝitajn pensojn kaj farojn de via vivo. Estas neeble kaŝi vin mem kaj viajn farojn antaŭ Dio "ĉar la okuloj de la Eternulo ĉirkaŭrigardas la tutan teron, por subteni tiujn, kies koro estas plene aldonita al Li." ( 2 Kronikoj I6 : 9) "ĉar liaj okuloj estas super la vojoj de homo, kaj ĉiujn liajn paŝojn Li vidas. Ne ekzistas mallumo nek ombrego, kie povus sin kaŝi malbonaguloj." (Ijob 34 : 2I-2) "Sed Jesuo ne konfidis Sin al ili, ĉar Li konis ĉiujn". (Johano 2: 24) Do "feliĉa estas tiu, kies krimo estas pardonita, kies peko estas kovrita. Feliĉa estas la homo, al kiu la Eternulo ne kalkulas lian kulpon kaj en kies spirito estas nenia malvero" (Psalmo 32 : I-2)
(Legu ankaŭ Psalmon 5I)
Eĉ hodiaŭ Jesuo ankoraŭ estas vokanta "Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigas."
(Mateo II : 28-30)

Download from www.angp-hb.co.za 


## ONI KLARIGAS LA BILDOJN

### BILDO LA UNUA

Tiu ĉi bildo malkaŝas la koron de mondama nerenaskiĝinta homo, kiun la Biblio nomas pekulo, tiu estas, iu kiu estas regata de la spirito de tiu ĉi mondo kaj de la deziroj kaj pasioj de la karno. Tio ĉi estas fidela bildo de la koro kiel Dio ĝin vidas. La brulumaj ruĝaj okuloj estas signo de ebrieco, kiun Sentencoj 23 : 29-33 priskribas jene :-
"ĉe kiu estas ploro? ĉe kiu estas ĝemoj? ĉe kiu estas malpaco? ĉe kiu estas plendoj? ĉe kiu estas senkaŭzaj batoj? ĉe kiu estas malklaraj okuloj? ĉe tiuj, kiuj sidas malfrue ĉe vino, ĉe tiuj kiuj venis, por gustumi aroman trinkaĵon.
Ne rigardu la vinon, kiel ruĝa ĝi estas, kiel ĝi brilas en la pokalo, kiel glate ĝi eniras. En la fino ĝi mordas kiel serpento kaj pikas kiel vipuro. Viaj okuloj vidos fremdaĵojn kaj via koro parolos malĝustaĵojn."

Sub la kapo enbilde povas esti vidata la homa koro----priloĝata de diversspecaj bestoj kiuj simboligas la multajn kaj diversspecajn pekojn en la homa koro, ĉar la koro estas la loĝejo kaj sidejo de niaj pekoj. Dio sciigis al ni pere de la buŝo de Sia profeto Jeremia, ke "malica estas ĉies koro kaj nefidinda; kiu povas ĝin ekkoni?" (Jeremia I7 : 9)
Jesuo mem konfirmas tion ĉi dirante "ĉar de interne, el la koro de homoj, eliras malvirtaj pensoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, mortigoj, adultoj, avideco, malindaĵoj, ruzeco, voluptoj, malica okulo, blasfemo, aroganteco, malsaĝeco; ĉiuj tiuj malbonoj elvenas de interne kaj profanas la homon" (Marko 7 versoj 2I-23)

<u>LA PAVO</u>. ĉiuj ja admiras la belecon de la pavo sed ĉiloke en la koro de la homo ĝi simboligas la pekon fiero. Lucifero, la



(I) LA PEKULA KORO

Download from www.angp-hb.co.za 

sanktoleita kerubo, iam la lumportanto de Dio, anĝelo de Dio, falis pro fiero kaj tiamaniere fariĝis la malamiko de Dio---- la Diablo. (Jesaja I4 : 9-I7; Jeĥezkel 28 : I2-I7)

Fiero venas el la profundaĵoj de la infero kaj sin montras multmaniere. Kelkaj homoj fieras pri siaj riĉaĵoj, sia grado de klereco, laŭmodaj vestaĵoj per kio ili senhonta-maniere vidigas siajn korpojn; juveloj kiaj braceletoj, ring-oj, k.t.p. kiel tiel trafe estas priskribita en Jesaja 3 : I7-24. Aliaj fieras pri siaj prapatroj, nacieco, kulturo,sporto, k.t.p., forgesante ke "Dio kontraŭstaras al la fieruloj, sed al la humiluloj donas gracon." (I Petro 5 : 5). Dio malamas fieron kaj arogantecon laŭ Sentencoj 8 : I3. "Antaŭ la pereo iras fiereco; kaj antaŭ la falo iras malhumileco." (Sentencoj I6 : I8)

LA VIRKAPRO. Malbonodora, malĉasta bestaĉo---- simboligas karnajn voluptojn, malmoralecon, malĉastadon, adultadon. La suprenomitaj pekoj tielgrade plimultiĝis dum tiuj ĉi modernaj sed lastaj tagoj ke ni estas devigataj konfesi la verecon de la Jesuaj vortoj, kiam Li antaŭ preskaŭ 2,000 jaroj antaŭdiris ke la lastaj tagoj estos kiaj la tagoj de Sodom kaj Gomora. Ne nur tiu ĉi moderna spirito ekposedis homojn kaj estas enir-inta la hejmojn de religiaj homoj kaj institucioj, niajn lern-ejojn kaj ties loĝejojn, sed la putrigaj semoj de tio senhonta-maniere kaj diable ruze estas semataj en la korojn de la hom-aro pere de kinoj, teatroj, filiteraturo kaj je diversaj aliaj manieroj ĝis tielgrade ke tio kion Dio nomas "peko", nune estas opiniata kaj nomata "moderna moraleco". Ĉe milionoj da gejunuloj la kino kaj modernaj romanoj estas la imitenda ekzemplo por la "ideala vivo" kaj pro tio pliposte ili sin trovas en diversspeca sufero, honto kaj konsciencriproĉo.

Download from www.angp-hb.co.za 

Malmoralaj kaj malĉastevivaj geaktoroj fariĝas la geherooj de la junularo. La dancejoj sammaniere tre ofte estas la elkovujo de malĉasteco. La diaj herooj de anima pureco, ekzemple Jozef (Genezo 39) kaj similaj ne plu estas opiniataj imitindaj ekzemploj. Eĉ la primitiva Zulua idolano, kiu mortpunus adultulon aŭ adultulinon, kapablas instrui diversaĵojn al nia laŭŝajne civilizita generacio kaj kondamni nin je la Granda Juĝa Tago. Dio instruas al ni ne ludi kun malĉastado sed fuĝi de tio. "Forkuru de malĉasteco. Ĉiu peko, kiun homo faras estas ekster la korpo; sed tiu kiu malĉastas, pekas kontraŭ sia propra korpo. Aŭ ĉu vi ne scias, ke via korpo estas templo de la Sankta Spirito, kiu estas en vi kaj kiun vi havas de Dio? Kaj vi ne apartenas al vi mem."(I Korintanoj 6 ; I8-I9) "Se iu detruas la templon de Dio, tiun detruos Dio; ĉar la templo de Dio estas sankta, kaj vi estas tio." (I Kor. 3 : I7)

LA PORKO La porko simboligas la pekojn drinkemeco kaj manĝegemeco. Estas malpurema bestaĉo kiu englutas ĉion antaŭ si---- puran kaj malpuran---- kaj sammaniere la pekema koro enigas malpurajn sugestojn, malpurajn esprimojn, malpurajn bildojn, malpuran legaĵon, kaj tie plue. La korpo kiu estu templo de la Vivanta Dio, estas malpurigata pere de malpuraj manĝaĵoj kaj malpuraj kutimoj kiaj tabako, opio, difektigaj drogoj kaj piloloj, k.t.p.. La kutimo fumi tabakon kaj opion (kaj ties parencaĵojn) nuntempe sklavigas homojn kiel neniam pasintece. Nur la dia forto kapablas liberigi la kompatindajn pertabakajn viktimojn kaj alispecajn gesklavojn de la diablo. Malgraŭ tio ke la plej multaj religiemaj homoj ne eĉ pripensus fumi en preĝejo, opiniante ĉi tion malsanktigo de sanktaĵo, ili tamen senhezite pere de tiu ĉi malbonodora fiplantaĵo malpurigas tion kio ververe estas la templo de Dio, nome, siajn

Download from www.angp-hb.co.za 

korpojn. "Ĉu vi ne scias" diras la Apostolo Paŭlo, "ke vi estas templo de Dio kaj ke en vi loĝas la Spirito de Dio? Se iu detruas la templon de Dio, tiun detruas Dio". (I Kor. 3 : I6-7; 6 : I8-9)

Manĝegema homo same estas abomenaĵo antaŭ Dio. Ni manĝas por ke ni vivu; ni ne vivas por manĝi. Malsato estas forigata pere de nutraj manĝaĵoj sed avido senĉese kriadas "Donu, donu!"

Avido neniam estos kontentigita, neniam estos satigita. Laŭ la Malnovtestamenta Leĝaro manĝegemulo kaj ebriulo estu ŝtonmortigata (Readmono 2I : I8-2I). "Drinkemulo kaj manĝegemulo malriĉiĝos, kaj dormemulo havos sur si ĉifonaĵojn." (Sentencoj 23 : 2I). Kunulo de malĉastuloj hontigas sian patron." (Sentencoj 28 : 7). Memoru ke iu riĉulo, manĝegemulo kaj sklavo de siaj voluptoj, mortis kaj, estante eninfere kaj suferante nepriskribeblan turmenton, eklevis siajn okulojn. Ne eĉ bezoniĝas mencii la malbonajn sekvaĵojn de drinkado. Estas tro bone konataj por esti opiniataj bagatelaĵoj. Dio tre klare en Sia Vorto deklaras al ni ke neniu drinkemulo heredos la Dian Regnon. Biero ne estas manĝaĵo, sed mortiga venenaĵo, kiu konfuzigas kaj influas la menson, kun rezulto ke tiuj kiuj enigadas tion, agadas malsaĝe. Ili malĉastiĝas kaj eĉ reciproke sin mortigas kaj murdas---- ion kion ili aliokaze ne estus farintaj. "La vino estas blasfemanto, ebriiga trinkaĵo estas sovaĝa; Kaj kiu delogiĝas per ili, tiu ne estas prudenta" (Sentencoj 20 : I)

Tiuj kiuj produktadas kaj vendadas drinkaĵojn estas same kulpaj antaŭ Dio, ĉar Dio diras "Ve al tiuj, kiuj estas herooj por trinki vinon, kaj bravuloj, por miksi ebriigaĵon." (Jesaja 5 : 22) "Ve al vi, kiu drinkigas sian proksimulon, por elverŝi vian koleron, kaj ebriigas lin por vidi lian

Download from www.angp-hb.co.za 

honton." (ĥabakuk 2 : I5) "Harpo, psaltero, tamburino, fluto, kaj vino estas en iliaj festenoj; sed la verkon de la Eternulo ili ne rigardas" (Jesaja 5 : I2) "Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek avidulojj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj heredos la regnon de Dio" (I Korintanoj 6 : 9-IO).

La pekoj pro nia surtera naturo estas listigitaj en Galatoj 5 : I9-20. Jen:- "Evidentaj estas la faroj de la karno, kiuj estas malĉasteco, malpureco, voluptemo, idolkulto, sorĉado, malamikeco, malpaco, ĵaluzoj, koleregoj, partiemeco, skismoj, herezoj, envioj, ebrieco, diboĉado kaj aliaj similaj, pri kiuj mi avertas vin, kiel mi jam antaŭe admonis vin, ke tiuj kiuj tion faradas, ne heredos la regnon de Dio."
"Ne ebriiĝu per vino, en kio estas diboĉo, sed pleniĝu per la Spirito." (Efesanoj 5 : I8)

Jen la Jesua invito al la soifantoj :- "Se iu soifas, tiu venu al mi kaj trinku. Kiu kredas al mi, kiel la Skribo diras, el ties ventro fluos riveroj da viva akvo" (Johano 7 : 37-38) "Ho vi, ĉiuj soifantoj, iru al la akvo, kaj vi kiuj ne havas monon; iru, aĉetu kaj manĝu; iru, aĉetu sen mono kaj sen pago vinon kaj lakton." (Jesaja 55 : I)
"Kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo." (Johano 4 : I4)

LA TESTUDO. Tiu ĉi besto simboligas, mallaboremecon, prokrastemecon kaj sorĉadon. Nekredemo estas kia la peko sorĉado.
"La deziro de mallaborulo lin mortigas, ĉar liaj manoj ne volas labori. Tuttage li forte deziras." (Sentencoj 2I : 25-26)
Josuo siatempe jam devis diri al la Izraelidoj ke ili ne estu

Download from www.angp-hb.co.za 

mallaboremaj ekposedi la landon. La homa naturo estas tre mallaborema rilate al la akiro de diaĵoj. Jesuo diris:- "Strebu eniri tra la mallarĝa pordo." (Luko I3 : 24) "Serĉu kaj vi trovos." (Luko II : 9). "La regno de la ĉielo estas perfortata kaj perfortuloj kaptas ĝin." (Mateo II : I2)

Mallaboremeco rilate al la savo kaj spirita bonstato de niaj animoj kondukas al eterna perdiĝo. Ĝi malebligas al ni preĝadi, ekzameni la profundaĵojn de Dio kaj ekposedi la plej riĉajn promesojn de Dio; ĝi kondukas al pereo. Kiam Dio estas parolinta al vi, instigante vin transdoni vian koron al Li hodiaŭ, la diablo konsilas al vi prefere fari tion morgaŭ aŭ je iu alia konvena tago, kiu bedaŭrinde eble neniam venos kaj kun rezultato ke vi mortus sen savo kaj sen Kristo. Dio diras "Hodiaŭ se vi aŭskultas Lian voĉon, ne obstinigu vian koron." (Hebreoj 3 : 7-8). Kiom da homoj perdiĝis pro tio ke ili prokrastis sian savadon ĝis iu pli konvena tago kiu bedaŭrinde neniam venis? Morgaŭ ne apartenas al vi.

La testuda ŝelo ofte estas uzata de primitivaj gentaj magiistoj en la praktikado de sia sorĉarto kaj pere de tiu ĉi bildo atentigas pri la peko sorĉado kaj ĉio parenca al tio, ekzemple la esploro de la estonto pere de diversaj "helpiloj". Ĉion tion la homoj faras prefere ol fidi la vivantan Dion. Speciale kiam temas pri tentoj kaj malsano, malbonsorto kaj familimorto, ni estas konsilataj alvoki la vivantan Dion kiu volonte helpas kaj ne fidi je bonŝanco ĉar "de la Eternulo fortikiĝas la paŝoj de virta homo." (Psalmo 37 : 23)
"Ĉu iu el vi malsanas? Li venigu la presbiterojn de la eklezio; kaj ili preĝu super li, ŝmirinte lin per oleo en la nomo de la Sinjoro; Kaj la preĝo de fido savos la malsanulon, kaj la Sinjoro relevos lin; kaj se li faris pekojn, tio estos pardonataj al li. Konfesu do viajn pekojn unu al la alia, kaj preĝu

Download from www.angp-hb.co.za 

unu por la alia, por ke vi resaniĝu." (Jakobo 5 : I4-I6) "Ĉar ne de oriento kaj ne de okcidento kaj ne de la dezerto venas alteco. Nur Dio estas juĝanto." (Psalmo 75 : 6-7) Dio ordonis al la Izraelidoj jene:- "Ne devas troviĝi inter vi iu, kiu trairigas sian filon aŭ filinon tra fajro, aŭguristo, antaŭdiristo, magiisto, sorĉisto nek subĵurigisto, nek elvokisto de spiritoj, nek signoklarigisto, nek esploristo de mortintoj; ĉar abomenaĵo por la Eternulo estas ĉiu kiu faras tion." (Readmono I8 : IO-I2) "Ekstere estas la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la mortigistoj kaj la idolanoj kaj ĉiu kiu amas kaj faras mensogon." (Apokalipso 22 : I5) "Ne turnu vin al magiistoj nek al sorĉistoj, ne provu malpuriĝi per ili; Mi estas la Eternulo, via Dio."(Levidoj I9 : 3I) "Kaj se oni diros al vi:- Demandu la antaŭdiristojn kaj la sorĉistojn, la flustristojn kaj la murmuretistojn, ĉar popolo ja demandas sian Dion, per la mortintoj por la vivantoj: tiam al la instruo kaj al la atesto! se ili ne diros konforme al tio, ili ne havos matenan ĉielruĝon." (Jesaja 8 : I9-20)

Dum vi estas leganta tiun ĉi libreton, Dio estas alparolanta vin, petante vin penti je viaj pekoj kaj transdoni vian vivon al Li, sed la testuda spirito kiu troviĝas en via koro, ĉiamaniere sugestas al vi prokrastadi la decidon kaj klopodas plenigi vian koron per timo. "Kion diros miaj hejmanoj, miaj amikoj, la ekstera mondo se mi fariĝus vera kristano? Kio okazus se mi ne plu partoprenus dancojn, amikajn kunvenojn kaj mondajn amuzaĵojn? Anstataŭ rigardi la nemezureblajn riĉaĵojn en Kristo Jesuo, Lian mirindan pacon, Lian nepriskribeblan ĝojon, Lian gloron, senmortan vivon estontan plena de ĝojo, vi komencas pripensi ĉion kion vi perdos aŭ "lasos" se vi permesus al Kristo enveni en vian koron dum timo je homoj same kiel timo je morto tenadas vin en la katenoj de la

Download from www.angp-hb.co.za 

diablo. Sed Kristo venis liberigi "tiujn kiuj per timo de morto, dum la tuta vivo estis subigitaj al sklaveco." (Heb. 2 : I4-I5) La spirito de prokrastado estas malmoliganta vian koron ĝis tio ĉi estas malmola kia la testuda ŝelo.

LA LEOPARDO estas tre furioza kaj kruela besto. Malamo, kolero kaj malbonhumoro ofte regas la homan koron kaj pelas la homon al murdo kaj similaj nefarendaĵoj. Vi povas klopodi kaj eĉ sukcesi regi vian malbonhumoron ĝis foje tio neatendite kaj bombsimile eksplodas. Plejbone estus konfesi ke tio troviĝas en via koro kaj peti Jesuon liberigi vin de tio. "Sed nun ne afliktiĝu" (Genezo 45 : 5) "Detenu vin de kolero kaj forlasu furiozon; ne incitiĝu ke vi ne faru malbonon" (Psalmo 37 : 8) "Kolero estas kruelaĵo, kaj furiozo estas superakvego sed kiu sin tenos kontraŭ envio?"(Sentencoj 27 : 4) "Ne rapidu koleri en via spirito; ĉar koleremeco loĝas en la brusto de malsaĝuloj" (Predikanto 7 : 9) "Sed nun formetu ankaŭ la jenajn :- koleron............." (Koloseanoj 3 : 8)

Multaj timuloj enigas alkoholaĵojn aŭ por trankviligi sian koleremon aŭ por akiri la bezonotan kuraĝon por ia malbona faro, venĝo k.t.p. sed "galo de drakoj estas ilia vino, kaj pereiga veneno de aspidoj." (Readmono 32 : 33) Venĝo estas dolĉa je la pekema koro, sed Dio estas nia venĝanto. Jesuo diris ke ni amu nian proksimulon kiel nin mem kaj ke ni amu niajn malamikojn. Dio promesis pardoni niajn pekojn se ni ankaŭ pardonas tiujn kiuj malbone agas kontraŭ ni. Kolermuta grumblema spirito same estas abomenaĵo antaŭ Dio. La malbona avideco je sangoverŝado kaj milito troviĝas en la homa koro kaj pro tio vera paco ankaŭ envenu en la homan koron por esti ĉiamdaŭra.

LA SERPENTO trompis Evan en la ĝardeno Edena kaj detruis la

Download from www.angp-hb.co.za 

belan kunulecon kaj harmonion inter Dio kaj homo. Satano, la faliĝinta anĝelo pleniĝis de ega ĵaluzo kontraŭ Adamo kaj Eva kiam li ekvidis ilin kiel la mondgeregantojn, troviĝantaj en perfekta harmonio kun Dio, kaj kiel anstataŭulojn de Lucifero. Pro ĵaluzo Satano komencis projekti ilian detruon kaj sukcesis al li detrui ilian vivon da plena harmonio kun Dio. Tiu sama diabla ĵaluzo kaj envio troviĝas en la koroj de multaj kiam ili alrigardas la ĝojon kaj kontentecon de aliuloj. "La ĵaluzo estas nefleksebla kiel ŝeol."("Alta Kanto 8 : 6). ĝi enigas malbonajn pensojn en la koron por detrui la ĝojon de aliuloj kaj eĉ kondukas al murdo. Tio ĉi speciale rilatas al geedzoj. En komercado same kiel en aliaj sektoroj de la ĉiutaga vivo ĝi kaŭzas nepriskribeblan malamon kaj suferon. Eĉ pastroj kaj aliaj kristanaj laborantoj ofte kulpas je tio kaj sekve ili daŭre estu singardaj kaj plenaj de la pura "Dia amo kiu estas elverŝata en niajn korojn pere de la Sankta Spirito" por ke sia utilo je Dio kaj la spirita tasko ne estas malpliigata kiam foje okazus ke Dio pli benige uzas alian de Siaj servistoj ol ilin.

LA RANO kiu sin nutras de teraĵo, ĉiloke simboligas la pekojn avideco kaj la monamo kiu estas "la radiko de ĉia malbono." (I Timoteo 6 : IO) Iaj ranoj en la Kongorivera regiono (Afriko) laŭ rigardintoj ofte tiel avide englutadas formikojn ke ili diskrevas pro tio. Avidulo malvole malfermas sian manon por helpi al la malriĉuloj kaj bezonantuloj sed ĉiamaniere, honeste kaj malhoneste, klopodas gajni kaj kunigi la riĉaĵojn de tiu ĉi mondo kiuj finfine tamen difektiĝos kaj detruiĝos. Jesuo mem estis dirinta, "ne provizu al vi trezorojn sur la tero, kie tineo kaj rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj trafosas kaj ŝtelas; sed provizu al vi trezorojn en la ĉielo, kie nek tineo nek rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj nek trafosas nek ŝtelas; ĉar

Download from www.angp-hb.co.za 

kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro." (Mateo 6 ; I9-2I). Aĥan kaj sia domanaro estis detruitaj ĉar li amis oron kaj arĝenton kaj juvelŝtonojn kaj vestaĵojn. (Josuo 7) Judas Iskarioto, la disĉiplo de Jesuo sin pendigis ĉar la monamo igis al li perfidi sian Sinjoron kaj Majstron. Nek la mono nek la oro estas la malbonaĵo sed la amo je tio troviĝanta en la homa koro.

Miloj da homoj el ĉiuj popoloj kaj sociaj tavoloj estas detruantaj siajn vivojn kaj tion de siaj familianoj pere de malbona deziro akiri grandan kaj subitan riĉaĵon ĉe vetludado, inter alie, ĉe hundaj kaj ĉevalaj vetkuroj. La dezirego riĉiĝi senpene kondukas al ŝtelado kaj murdo, eĉ memmortigo. Monamo kaj avido havas multajn kunulojn, kiel ekzemple amo je famo kaj potenco; eble estus politika potenco por superregi aliajn, financa potenco por subpremi la malriĉulojn; religia potenco, pli fervorega je la nomo de eklezia organizaĵo ol je la nomo de Dio kaj kondamnanta kredulon kiu aŭdacus sekvi Kriston alimaniere ol per aneco de lia speciala eklezio.(Marko 9 : 38-39) Jesuo diris, "zorgu, kaj gardu vin kontraŭ ĉia avideco, ĉar la vivo de homo ne konsistas en la abundeco de liaj posedaĵoj. (Luko I2 : I5). Jen la rakonto pri riĉa malsaĝulo:- "La bieno de unu riĉulo donis abunde; kaj li konsideris, dirante: Kion mi faru, ĉar mi ne havas lokon, kie mi povas amasigi miajn fruktojn? Kaj li diris: Jen kion mi faros: mi disbatos miajn grenejojn kaj konstruos pli grandajn, kaj tie mi amasigos mian grenon kaj miajn posedaĵojn. Kaj mi diros al mia animo: Animo, vi havas multajn posedaĵojn, provizitajn por multaj jaroj; ripozu, manĝu, trinku, estu gaja. Sed Dio diris al li: Ho senprudentulo! ĉi tiun nokton, oni postulos de vi vian animon; kies estos tio, kion vi preparis? Tia estas tiu, kiu kolektas por si trezoron, kaj ne estas riĉa rilate Dion." (Luko I2 : I6-2I)

Download from www.angp-hb.co.za 

"Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon?" (Marko 8 : 36) "Ne zorgu pri via vivo, kion vi manĝu; nek pri via korpo, kion vi surmetu........Sed celu Lian regnon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi.......... ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro." (Luko I2 : 22-34)

SATANO, la patro de ĉiuj mensoguloj, organizas ĉiujn pekojn kaj estas la reganto de la koro. Jesuo diris, "Vi estas de patro, la diablo, kaj vi volas fari la dezirojn de via patro. Li estis hommortiganto de la komenco, kaj ne staras en la vero, ĉar vero ne estas en li. Kiam li parolas mensogon, li parolas sian propraĵon, ĉar li estas mensoganto kaj la patro de ĝi." (Johano 8 : 44). Eta mensogo kaj ega mensogo estas egale malbonaj. Estas mensogoj parolataj, skribataj kaj farataj. Hipokritulo estas mensogulo ĉar li ŝajnigas esti tio kaj tia, kio li ne estas. Dio ne kapablas mensogi kaj same ne Kristano (Tito I : 2) "Se ni diras, ke ni havas kunulecon kun Li, kaj iradas en la mallumo, ni mensogas kaj ne faras la veron." (I Johano I : 6) "Ekstere estas la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la mortigistoj kaj la idolanoj, kaj ĉiu, kiu amas kaj faras mensogon." (Apokalipso 22 : I5)
"..........aferoj, kiujn la Eternulo malamas..........Falsa atestanto, kiu elspiras mensogojn...." (Sentencoj 6 : I6-I9)

LA STELO simboligas la konsciencon troviĝanta en la koro de ĉiu homo. Ĉiloke ĝi estas nigra, malpura kaj malbona, eble mortinta pro daŭra kaj obstina pekado, blindiĝinta kaj ne plu kapabla prijuĝi siajn proprajn farojn. Tiu ĉi malbona konscienco foje estas trankvila, foje afliktiĝinta. ĝi akuzas kiam ĝi senkulpigu kaj male. Eble estus kaŭterizita kvazaŭ per varmega feraĵo kaj jam sen ĉia sentado kaj juĝpovo pro sia foriro de la Fido,

sia atentado al spiritoj delogantaj kaj al diablaj doktrinoj kaj hipokrite eligitaj mensogoj. (Laŭ I Timoteo 4 : I-2; Hebreoj IO : 22)

LA OKULO de Dio vidas ĉion kio estas okazanta interne de la koro. Troviĝas nenio kaŝebla antaŭ Lia flama okulo kaj pro tio Li scias kaj vidas ĉiujn sekretajn pensojn kaj intencojn de la koro. Negrave ĉu vi faras viajn malbonajn agojn dum la plej malluma nokto, en la plej densa arbaro, en la plej profunda fosaĵo aŭ ĉie ajn aliloke, Dio tion alrigardas. (La okulo en tiuj ĉi bildoj ankaŭ konformas al la esprimo sur la vizaĝo de la viro.)

LA LANGETOJ DE FAJRO ĉirkaŭ la koro simboligas la Dian amon kiu ĉirkaŭas la pekan koron. Malgraŭ tio ke Dio malamas pekon, Li amas la homon kaj ne deziras la morton de pekulo sed ke tiu pentu kaj vivu. Jesuo ja venis por savi pekulojn. Granda ĝojo estas en la ĉielo pro unu pekulo pentinta. La etaj fajrolangoj ankaŭ simboligas la sangon de Jesuo Kristo, "la ŝafido de Dio kiu forportas la pekon de la mondo." (Johano I : 29)

LA ANĜELO figuras la Vorton de Dio. Dio deziras alparoli la trompitan pekŝarĝitan viron aŭ virinon por ke li aŭ ŝi pentu kaj permesu al la lumo kaj amo de Dio eniri sian koron.

LA KOLOMBO estas simbolaĵo de la Sankta Spirito, la Spirito de la vero kiu konvinkas rilate al pekado, justeco kaj juĝado. La Sankta Spirito ĉiloke troviĝas ekster la homa koro. Ĝi ne povas loĝi kie peko regas.

Se la bildo de tiu ĉi koro estus konforma al la stato de via propra koro, tiam krie alvoku la Sinjoron, malfermu

Download from www.angp-hb.co.za 

vian koron al Li, permesu al la lumo de Lia Vorto enbrili en ĝin. "Kredu je la Sinjoro Jesuo Kristo kaj vi estos savata." Dio ja volas helpi al vi kaj savi vin. Li estas promesinta ŝanĝi vian koron, doni al vi novan koron kune kun novan spiriton interne de vi. Tio estas montrata en la dua bildo.


## BILDO LA DUA

Tiu ĉi bildo montras pentantan koron kiu komencas serĉi Dion. La anĝelo estas tenanta la glavon, la Vorton de Dio, kiu estas "viva kaj energia, kaj pli akra ol ĉia glavo dutranĉa kaj penetranta ĝis divido de la animo kaj spirito, kaj de artikoj kaj medolo, kaj kritikanta la pensojn kaj celojn de la koro." (Hebreoj 4 : I2) La Vorto de Dio memorigas al li ke "morto estas la salajro de la pekado" kaj ke "estas dekretita por homoj unufoje morti, kaj post tio juĝo" (Hebreoj 9 : 27) La lotaĵo de la pekulo kaj la nekredulo estas "en la lago, brulanta per fajro kaj sulfuro" (Apokalipso 2I : 8)

En la alia mano de la anĝelo troviĝas kranio. Tio memorigas la pekulon ke ni ĉiuj iam devas morti. Tiu korpo nia, kiun ni tiel ege amas, vestas, nutras kaj beligas, kiun ni tiele prizorgas kaj atentas, por kontentigi ĉiujn ĝiajn dezirегojn kaj voluptojn, finfine mortos kaj putriĝos kaj estos formanĝata de la vermoj sed nia animo kaj spirito vivos eterne kaj iam devos aperi antaŭ la juĝa seĝo de Dio.

Jen ni vidas kiel la pekulo komencas atenti la dian komunikaĵon kaj malfermi sian koron al la Dia amo. La Sankta Spirito komencas lumi en la malluman pekeman koron. La lumo de Dio eniros sian templon por forpeli la mallumon. Kiam la Dia lumo eniras, mallumo devas malaperi. Peko, figurata de la divers specaj bestoj, devas fuĝi. Pro tio, kara leganto, permesu al

Download from www.angp-hb.co.za 




(2) LA KONVINKIĜINTA CEDEMA KORO

Download from www.angp-hb.co.za 

Jesuo, la Lumo de la mondo, eniri vian koron, kaj la mallumo kaj ties faroj devos forlasi la koron, kiel klarigita en tiu ĉi bildo. Jesuo diris, "mi estas la lumo de la mondo; kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo" (Johano 8 : I2). Vi neniam sukcesos forpeli la mallumon el via koro per viaj propraj penoj, via propra saĝeco, aŭ per homa saĝeco. La plej simpla, plej certa, plej rapida kaj plej efika kaj sola rimedo, estas permesi al Jesuo, la Lumo, enveni, kaj mallumo---- tio estas, peko---- devas foriri. La luno kaj la steloj ja iomete prilumas la vojon dum malluma nokto sed post sunleviĝo kaj la mallumo kaj la noktaj lumiloj malaperas.
Jesuo estas la Suno de justeco. Kiam Li eniris la templon ĉe Jerusalem, Li elpelis ĉiujn tiujn kiuj tie vendis bovojn, ŝafojn kaj kolombojn kaj renversis la tablojn de la monŝanĝistoj, dirante, "estas skribite :- 'mia domo estos nomata domo de preĝo'; sed vi faris ĝin kaverno de rabistoj." (Mateo 2I : I3) Via koro estas destinita esti la domo de Dio, la templo de Dio. Li deziras loĝi en ĝi, beligi ĝin, plenigi ĝin per lumo, amo kaj ĝojo. Jesuo ne nur venis pardoni niajn pekojn, sed Li venis ankaŭ liberigi nin de la potenco kaj la regado de la peko.
"Se do la Filo (Jesuo) vin liberigos , vi estos efektive liberaj." (Johano 8 : 36)

## <u>BILDO LA TRIA</u>

Tiu ĉi bildo montras al ni la koran staton de pekulo kiu vere pentas. Li nun vidas la grandecon kaj terurecon de siaj multaj **pekoj** pro kio Jesuo mortis sur la kruco. Dum li alrigardas la krucon kiun la anĝelo, la Vorto de Dio, montras al li, tio rompas lian nune penteman koron. Li vidas la grandan


Download from www.angp-hb.co.za 

amon de Dio kiel elmontrita en Kristo Jesuo kaj tiu amo fandas lian koron speciale kiam li komencas konstati ke Jesuo Kristo, la Filo de Dio, estas veninta por forigi liajn multajn pekojn kaj ke Jesuo volonte prenis lian lokon por morti sur la malbenita lignaĵo.

La fakto ke Jesuo estis skurĝita, kronita per dornoj, ke kruelaj najlegoj estis trabatitaj tra Liaj manoj kaj piedoj kaj ke finfine Li mortis sur kruco pro niaj pekoj, profunde malĝojigas la penteman pekulon kaj okazigas tutan renversiĝon en lia koro kaj vivo. Dum li legas la Dian Vorton, li rigardas sin mem pere de tio, kvazaŭ en spegulo, li pli kaj pli konstatas kiome li estas vaginta for de Dio kaj estas malatentinta Liajn ordonojn. Profunda dia malĝojo kaj pentado lin kaptas kaj dum li kun larmoj kaj malĝoja plorado elverŝas sian koron antaŭ Dio, Jesuo alproksimiĝas al li. La Diaj amo kaj paco eniras lian koron dum li komencas konstati ke "la sango de Jesuo, Lia Filo, nin purigas de ĉia peko"(I Johano I : 7) "Proksime estas la Eternulo al tiuj, kies koro estas rompita, kaj la spirite suferantajn Li helpas" (Psalmo 34 : I8) Ankoraŭfoje la Vorto de Dio deklaras, "Nur tion Mi rigardas: humilulon kaj spirite-afliktiton kiu respektegas Mian vorton" (Jesaja 66 : 2) La Sankta Spirito flustras la Jesuajn vortojn al li: "Kuraĝu, filo (filino), viaj pekoj estas pardonitaj" (Mateo 9 : 2) Dum li ankoraŭ rigardadas la krucon kaj la verŝitan sangon de Jesuo, kaj sincere kredante ke ĉio tio estas farita por li persone, li komencas konstati ke la pekŝarĝego estas malaperinta ĉar Jesuo estas portinta niajn dolorojn kaj malĝojojn; ke "li estis vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj krimoj", ke "niajn malsanojn li portis sur si, kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis" (Jesaja 53)

La Sankta Spirito kaj la Dia amo ekposedas la

Download from www.angp-hb.co.za 




(3) LA PENTANTA KORO.

Download from www.angp-hb.co.za 

purigitan koron. Dum li per fido rigardas la krucon kaj Jesuon, li komencas konstati ke siaj pekoj estas pardonitaj kaj tiamaniere li akiras la certecon en sia koro ke "la sango de Jesuo, lia Filo nin purigis de ĉia peko". (I Johano I : 7) Li nune certa estas ke tiu kiu kredas je Jesuo, ne pereos sed havos eternan vivon (Johano 3 : I6) ĉar en Jesuo "ni havas la elaĉeton per Lia sango, la pardonon de niaj pekoj, laŭ la riĉo de Lia graco" (Efesanoj I : 7) La pekaj voluptoj de la karno nune estas anstataŭigitaj de profunda deziro vivadi por Dio kaj servi al Li "Kiu unue amis nin". Anstataŭ ami la mondon kaj ties aĵojn, li nun amas Dion kaj la Diajn aferojn.

En tiu ĉi tria bildo ni rimarkas la bestojn simboligantaj pekon jam ekster lia koro, kvankam Satano malvolas cedi sian antaŭan loĝejon kaj malantaŭen rigardas esperante trovi eblecon poste ree eniri. Estas pro tio ke la Sinjoro Jesuo avertas nin preĝadi kaj esti singardaj, kaj rezisti la diablon por ke li fuĝu for de ni.


## BILDO LA KVARA

Tiu ĉi bildo montras Kristanon kiu estas trovinta perfektajn pacon kaj savon pere de la surkruca morto de nia Sinjoro kaj Savanto, Jesuo Kristo, kaj "por mi ne estu fanfarono krom pri la kruco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, per kiu la mondo estas krucumita al mi, kaj mi al la mondo." (Galatoj 6 : I4) Jesuo mortis surkruce por ke ankaŭ ni "malvivigite koncerne pekojn, vivu por justeco" (I Petro 2 : 24)---- do estu kristanoj krucumitaj rilate al la mondo. Estas ordonata al ni:- "Iradu laŭ la Spirito, kaj la deziregon de la karno vi ne plenumos" (Galatoj 5 : I6) "Se ni vivas per la Spirito, en la Spir-

Kun Kristo mi krucumiĝis. (Galatoj 2 :20)

Vi mortis, kaj via vivo kaŝiĝis kun Kristo en Dio. (Koloseanoj 3 : 3)

Vi vin kalkulu mortintoj al peko, sed vivantoj al Dio en Kristo Jesuo. (Romanoj 6 : II)




(4) KRUCUMITA KUN KRISTO

Download from www.angp-hb.co.za 

ito ni ankaŭ iradu" (Galatoj 5 : 25)

La kolono al kio la Sinjoro estis ligita post kiam ili senvestigis Lin, estas figurata en tiu ĉi bildo de la koro, same kun la vipoj kaj skurĝoj per kio ili kruele skurĝis Lin. Li estis frapita pro niaj pekoj ĉar "puno por nia bono estis sur Li". Herodo kaj siaj homoj primokis Lin, kaj skurĝinte Lin, premis dornan kronon sur Lian kapon, anstataŭ kroni Lin per ora krono. Ili metis kanon en Lian dekstran manon anstataŭ reĝan sceptron, kliniĝis antaŭ Li, kaj primokis Lin, dirante "Salutojn! Reĝo de la Judoj"! Ili kraĉis sur Lin, ekprenis la kanon de Li kaj per tio frapis Lin sur la kapon. Post kiam ili tiel hontinde kaj kruele estis primokintaj Lin, ili forkondukis Lin por esti krucumata.

Troviĝas multaj kristanoj, laŭ si mem, kiuj preĝas en preĝejoj, partoprenas la Sanktan Vespermanĝon, kantas la Diajn kantojn kaj tamen per siaj malbonaj faroj daŭre rekrucumas sian Savanton. "Ne ĉiu, kiu diras al Mi: 'Sinjoro, Sinjoro', eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo.........(kaj pluen) (Mat. 7 : 2I-7)

En tiu ĉi bildo ankaŭ vidiĝas la sako da mono apartenintа al Judas, kiu perfidis la Sinjoron Jesuon kaj vendis Lin je tridek arĝentaj moneroj ĉar monamo estis kaptinta lian koron kaj blindiginta lian menson. La lanterno, katenoj k.t.p. estis uzitaj de la soldatoj kiuj arestis Jesuon dumnokte. La ĵetkuboj estis uzitaj de la soldatoj kiam ili lotis pri Liaj vestaĵoj (Mateo 27 : 35) kaj tiamaniere plenumante profetadon. "Ili dividas miajn vestojn inter si, pri mia tuniko ili lotas". (Psalmo 22 : I8). Ili forprenis ĉion de Jesuo, sed Lin mem ili malakceptis, dirante "Ni ne volas ke tiu viro reĝu super ni." (Luko I9 ; I4)

Download from www.angp-hb.co.za 

La homaro ĝenerale treege ŝatas ricevi ĉiujn kaj ĉiajn benaĵojn de Dio---- ĉion de la pluvo kaj ĉion de la sunbrilo---- sed malvole submetiĝas al la sola regado de Dio. Ĉe multaj Dio nur gravas kiam ili bezonas helpon dum tempoj de aflikto kaj malespero.

Per la lanco la soldatoj trapikis Lian flankon kaj koron "kaj tuj elvenis sango, kaj akvo" (Johano I9 : 33-37)
Antaŭ ol la koko estis kriinta, Petro tri fojojn malkonfesis Jesuon sed poste li pentis per maldolĉaj larmoj. Ĉu vi estas konfesanta Jesuon per parolo kaj faro? Aŭ ĉu vi hontas tion fari antaŭ homoj? Jesuo diris: "Ĉiun do, kiu konfesos min antaŭ homoj, mi ankaŭ konfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Sed kiu malkonfesos min antaŭ homoj, tiun mi ankaŭ malkonfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo." (Mateo IO : 32-33)


Jesuo ankaŭ diris, "Kaj kiu ne prenas sian krucon kaj sekvas post mi, tiu ne estas inda je mi" (Mateo IO : 38)
Benataj estas tiuj kiuj staras sur la Roko Jesuo Kristo!

## BILDO LA KVINA

Tiu ĉi bildo montras la purigitan kaj sanktigitan koron de la pekulo savita per la abunda korfavoreco kaj kompato de Dio. Ĝi estas fariĝinta vera templo de Dio---- la loĝejo de Dio, la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, laŭ la promeso de la Sinjoro Jesuo Kristo, "Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li" (Johano I4 : 23)

La koro nun estas fariĝinta vera templo de Dio. Peko (la diversaj bestoj) estas forpelita. Anstataŭ tio nun troviĝas la Sankta Spirito, la Spirito de la Vero, en tiu koro. La koro ne

Download from www.angp-hb.co.za 




(5) LA TEMPLO DE DIO

Download from www.angp-hb.co.za 

plu estas la abomena sidejo de la peko sed estas fariĝinta bela fruktarbo aŭ ĝardeno liveranta la fruktojn de la Spirito, nome amon, ĝojon, pacon, paciencon, komplezon, bonkorecon, fidelecon, sinregadon (Galatoj 5 : 23) kaj aliajn bonplaĉaj al Dio kaj homo. Li nun estas fariĝinta fruktporta branĉo de la Vera Vinberarbo---- nia Sinjoro Jesuo Kristo. La sekreto de lia fruktportado estas ke li restas en Kristo, kaj Kristo kaj Siaj vortoj restas en li.(Johano I5 : I-IO) Pro tio ke li estas plenigita kaj baptita per la Sankta Spirito, li posedas potencon venki la karnon kaj ties voluptojn, kaj krucumi la malnovan homon.Per la potenco de la Sankta Spirito, nun estas eble je li iri en la Spirito kaj venki la karnon. Li ne plu vivas laŭ tio kion li vidas, aŭdas kaj sentas sed per fido---- ĉar fido en Kristo Jesuo estas la venko, kiu venkas la mondon. Li vivas per certa kaj viva espero kaj estas fortigata per la glorplena espero je la proksima reveno de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Li vivas per kaj en la ĉiamdaŭra amo de Dio.

"Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion". (Mateo 5 : 8) Malgraŭ siaj grandaj riĉaĵoj kaj siaj venkoj kontraŭ eksterlandaj malamikoj, Reĝo David bone sciis ke la plej granda batalo furiozas en sia propra koro. Li ankaŭ sciis la internan senpovecon kaj preĝis:- "Koron puran kreu al mi, ho Dio, kaj spiriton fidelan novigu en mi" (Psalmo 5I : IO) Neniu kapablas purigi sian propran koron, aŭ krei en si novan koron; Same kiel David, li venu al Dio kaj kun vera pento petu ke Dio kreu por li novan koron. Dio ege deziras fari ion novan en via vivo. Flikado de la ĉifonaĵoj de via propra justeco per malsinceraj promesoj kaj decidoj ne igos vian koron taŭga loĝejo por Dio. Li ege volonte helpos al vi, ĉar estas Li kiu promesis dirante, "Mi aspergos vin per pura akvo, kaj vi puriĝos de ĉiuj viaj malpuraĵoj, kaj de ĉiuj viaj idoloj Mi purigos vin. Kaj mi

Download from www.angp-hb.co.za 


donos al vi koron novan, kaj spiriton novan Mi metos en vin. Mi eligos el via korpo la ŝtonan koron, kaj mi donos al vi koron karnan. Kaj Mian spiriton mi metos en vin, kaj Mi faros, ke vi agados laŭ Miaj Leĝoj, kaj Miajn ordonojn vi observados kaj plenumados". (Jeĥezkel 36 : 25-27) Jen la signifo de la Nova Testamento kiun Dio estas sigelita per la sango de Sia Filo, Jesuo Kristo.

En tiu ĉi bildo ni ankaŭ rimarkas la anĝelon reaperanta. Anĝeloj estas enoficigataj servi tiujn kiuj heredos eternan vivon kaj plue starigi protektan barilon ĉirkaŭ tiujn kiuj timas Dion. (Laŭ Psalmo 34 : 7; 9I : II; Daniel 6 : 22; Mateo 2 : I3; I3 : 39; I8 : I0; Agoj 5 : I9; I2 : 7-I0)

Ankaŭ la diablo estas videbla en tiu ĉi bildo, proksime al la koro, kvazaŭ serĉante oportunon ree eniri sian estintan loĝejon. Pro tio estas konsilata al ni ĉiam esti atentaj kaj preĝantaj ĉar nia "kontraŭulo, la diablo, kiel leono blekeganta ĉirkaŭiras, serĉante, kiun li povos forgluti". (I Pet. 5 : 8) Tre ofte li estas alivestata kiel anĝelo de lumo, trompante la nesingardajn infanojn de Dio per la voluptoj de tiu ĉi mondo kaj klopodante per sia ruzeco forlogi eĉ la elektitaron (Mateo 24 : 24) "Rezistu la diablon, kaj li forkuros de vi"(Jakobo 4 : 7)

## BILDO LA SESA

Jen la malĝojiga bildo de ulo kiu malantaŭen estas glitanta al la antaŭa peka vivmaniero. (La Angloj ege trafe nomas tiaulon "backslider", tio estas, "malantaŭenglitanto"!) Unu okulo estas fermiĝanta, pro tio ke li komencis malvarmiĝi kaj endormiĝi en sia Kristana vivo dum la alia okulo senhonte estas ĉirkaŭrigardanta al kaj amindumanta kun la mondo. La lumo




(6) LA TENTATA KAJ DIVIDIĜINTA KORO

Download from www.angp-hb.co.za 

interne de li estas fariĝinta malhela kaj la enkoraj simbolaĵoj kiuj montru lian volontecon suferi kun Kristo malpliiĝis kaj ne plu staras vertikale (vidu la bildon). Li estas ĉirkaŭata de tentoj al kio li iom post iom estas cedanta anstataŭ rezisti ilin. Li ne plu aŭskultas la voĉon de Dio sed prefere atentas la ruzajn sugestojn kaj malsincerajn promesojn de la tentanto. Malgraŭ tio ke li eble ankoraŭ vizitus la preĝejon kaj kaŝus sian mondamecon sub vestaĵo de religieco, la amo al Dio estas malvarmiĝinta en lia koro. Li estas fariĝinta homo kun dividiĝinta menso kaj ŝvebas inter du opinioj. Li komencas amindumi kun la mondo sed samtempe ŝajnigas ke li amas Dion. La stelo en lia koro---- lia konscienco---- estas fariĝanta malhela. La krucon li ne plu portas ĝoje kaj ridete. Male ĝi estas fariĝinta peza malbonvena ŝarĝo. Lia fido komencas ŝanceliĝi, li ĉesas enpreĝe interparoli kun Dio, fariĝas indiferenta rilate al la stato de sia koro kaj iom post iom cedas lokon al la tentanto kiu embuske ekstere troviĝas. Li pli multe ŝatas mondan kuneston ol kunulecon kun veraj gekredantoj.

La spirito de la pavo---- kiu simboligas fieron---- klopodas eniri la koron. Li eble estas forgesinta ke li estas savita sole pro dia korfavoro kaj fariĝas fiera kristano. Ebrieco frapas la pordon kaj celas eniri. Eble estus iu speciala okazaĵo, en la kunesto de mondaj amikoj kie li hontus esti opiniata "stranga", malfortulo aŭ malsociama. La diablo flustras en lian orelon ke tiu unusola glaseto da - - - - -nepre ne difektos lian spiritan vivon. Karnaj pensoj kaj voluptoj ekaperas. Eble li komencas ree ĝui malĉastajn kaj dusignifajn ŝercojn, kun plezuro rigardi kaj rigardadi malĉastajn bildojn kaj ĝui malĉastan kunanaron. Li komencas viziti dancejojn, partopreni pridubindajn amuzojn. La diablo sukcese komencas influi lin kredi ke tio ĉi ja estas la homa naturo kaj ke tio aŭ tio ĉi vere ne estas peko.


Download from www.angp-hb.co.za 

Vere estas ke ni ne povas malebligi al la sovaĝaj birdoj de malbonaj malpuraj pensoj ĉirkaŭŝvebi super niaj kapoj sed tutcerte ni kulpas se ni permesas al ili surteriĝi sur niajn kapojn, konstrui siajn nestojn en niaj koroj kaj tie elkovi siajn malbonajn farojn. Se ni donus la maldikan fingron al la diablo, li ekkaptas la tutan manon, tiamaniere trenante animon kaj spiriton en ĉiamdaŭran inferan fajron. Pro tio Dio solene ordonas kaj avertas al ni fuĝi de la karnaj junulaj voluptoj kaj neniamaniere komenci ludi kun peko, negrave kiaaspekte tio venus al ni. Nepre fuĝu al Jesuo, la liberiganto kaj konkeranto. Rifuĝu ĉe li!

La surbilda ulo kiu per ponardo pikas la koron simboligas tiujn kiuj primokas kaj kontraŭas la Kristanecon kaj diadoradon. Pere de siaj kalumniaj langoj kaj mokemaj lipoj, ili trapikas kaj vundas la korojn de Kristanoj---- ĝuste tiajn atakojn dividiĝinta koro ne kapablas transvivi. Li komencas timi homojn plie ol Dion kaj timante tion kion la homoj eble dirus, pensus aŭ farus, li fariĝas sklavo de homoj kaj iom post iom forŝvebas for de Dio. Kolero kaj malbonhumoro montriĝas dum tempoj de aflikto kaj ĉagreno, kaj perforte eniras. La malbona serpento, la ĵaluzo, ekaperas kiam aliuloj spertas pli grandajn sukcesojn kaj pli multe prosperas. Se sukcesus al tio enrampi en la plej malgrandan fendeton de la koro, malamo kaj fiero facile sekvos tra malfermita pordo.

La monamo tiel facile eniras en niajn korojn, se ni malatentus la jenajn avertojn de nia Sinjoro Jesuo, "Viglu kaj preĝu por ke vi ne eniru en tenton" (Mateo 26 : 4I) Tiu do, kiu opinias, ke li staras, sin gardu, por ke li ne falu" (I Korintanoj IO : I2). Ni surmetu la tutan armilaron de Dio, por ke ni povu kontraŭstari al la artifikoj de la diablo. (Laŭ Efesanoj 6 : II-I8)

Download from www.angp-hb.co.za 




(7) LA FORFALIĜINTA AŬ MALMOLIĜINTA KORO

Download from www.angp-hb.co.za 

## BILDO LA SEPA

Tiu ĉi bildo simboligas la koran staton de forfaliĝinta ("malantaŭen glitinta") homo. Iam li estas estinta klera rilate al la spiritaj aferoj, estas gustuminta la ĉielajn donacojn kaj estas fariĝinta partoprenanto de la Sankta Spirito sed estas forfaliĝinta. Sammaniere ĝi ankaŭ montras la staton de persono kiu neniam pentis aŭ sin transdonis al Dio malgraŭ tio ke la vero de la Evangelio---- ankaŭ nomata la "Bona Novaĵo---- estis prezentata kaj malkaŝata al li. Ulo kiu malmoligas sian koron kiam Dio petegas, pli kaj pli malboniĝas malgraŭ siaj senefikaj penoj plibonigi sin mem.

Rilate al la "malantaŭenglitinto" Jesuo mem jene priskribis ties staton:- "Kiam la malpura spirito eliris el homo, ĝi trairas tra senakvaj lokoj, serĉante ripozon, kaj ne trovante ĝin, diras:- Mi reiros al mia domo, el kie mi eliris. Kaj alveninte, ĝi trovas ĝin balaita kaj ornamita. Tiam ĝi iras kaj alprenas al si sep aliajn spiritojn pli malbonajn ol ĝi mem, kaj ili, enirinte, loĝas tie; kaj la fina stato de tiu homo fariĝas pli malbona, ol la unua" (Luko II : 24-26)
"Al ili okazis laŭ la vera proverbo; Hundo reveninta al sia vomitaĵo, kaj porkino lavita al ruliĝado en koto" (2 Petro 2 : 22)

La Sankta Skribo klare priskribas la korstaton de "malantauenglitinto" aŭ de nepentema pekulo. Peko kun ĉio da sia trompemeco estas reveninta por enloĝi kaj regi la koron. Eĉ lia vizaĝo iagrade malkaŝas la staton de sia koro. La Sankta Spirito, tiu milda kolombo, estas devigata forlasi la koron, ĉar peko kaj la Sankta Spirito ne povas loĝi kune. La koro ne samtempe povas esti la templo de Dio kaj kavernaĉo de Satano. La anĝelo, la Vorto de Dio, same estas devigata malĝoje foriri,

Download from www.angp-hb.co.za 

tamen malantaŭen ekrigardante esperante ke la forfaliĝinto eble pentus kiel la perdita filo kiu "deziris plenigi sian ventron per la karoboj, kiujn la porkoj manĝis; kaj neniu donis al li. Sed reveninte al si, li diris: Kiom da dungitoj de mia patro havas panon abunde, sed mi ĉi tie pereas de malsato! Mi leviĝos, kaj iros al mia patro, kaj mi diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi; mi jam ne meritas esti nomata via filo"(Luko I5 : I6-I9). La patro, vidinte la pentem-an filon, pardonis kaj restarigis lin.

Sur tiu ĉi bildo vidiĝas neniaj signoj de vera pento, nenia reiro al Dio, li ne serĉas pardonadon ĉe la piedoj de Dio. Lia konscienco estas kvazaŭ kaŭterizita per varmega feraĵo kaj silentigita. Orelojn li havas sed ne aŭdas la peteg-an voĉon de Jesuo. Okulojn li havas sed ne rimarkas la senfund-an inferan abismon antaŭ si. Li ne plu hontas daŭre resti en siaj pekoj. La diablo regas lian koron kaj estas transpreninta la tronon de lia koro. Povus esti ke li ankoraŭ fanfaronus pri ekstera respektindeco, ankoraŭ havus eksteran religian aspekton kia blankigita tombo "sed interne estas plenaj de ostoj de mort-intoj kaj de ĉia malpureco" (Laŭ Mateo 23 : 27)

La patro de mensogoj nun estas transpreninta la lok-on de la Spirito de Vero. Ĉiu besto, ĉiu peko estas akompanata de speciala diablo kaj malpura spirito kaj la tuta hordo nun troviĝas en la koro. Eĉ ke li ŝatus sin liberigi de tiuj fiaj turmentantoj, ili tamen tenas lin katenita. "Tiu, kiu malŝatis la leĝon de Moseo, sen kompato mortas ĉe du aŭ tri atestantoj; kiom pli severan punon, vi opinias, ke meritos tiu, kiu pied-premis la Filon de Dio kaj rigardas kiel ne sanktan la sangon de la interligo, per kiu li estis sanktigita, kaj kiu spitis la Spiriton de graco?" (Hebreoj IO : 28-29) Legu ankaŭ 2 Petron 2 : I-4)


Download from www.angp-hb.co.za 

Se tiu ĉi bildo estus respegulaĵo de via koro, kara amiko, tiam senprokraste alkriu Dion de el la profundaĵo de via koro. Li povas kaj deziras pardoni ĉiujn kaj ĉiajn pekojn se vi nur penteme kaj sincere Lin alproksimiĝas. Li havas la potencon kateni la diablon kaj ties tutan hordon kaj ilin elĵeti de el via koro se vi volonte petus kaj permesus al Li tion fari. Alproksimiĝu kiel la leprulo kiu venis al Jesuo dirante "Se vi nur volas, vi povas min purigi." Respondis Jesuo, "mi volas, estu purigita" (Marko I : 40-4I) Sed se vi daŭrigus malmoligi vian koron, kaj ami mallumon prefere ol lumon, ekzistos neniu espero, neniu helpo ĉar vi estas elektanta morton anstataŭ vivon "ĉar la salajro de peko estas morto" (Romanoj 6 : 23)

## BILDO LA OKA

Ĉi bilde vidiĝas la prokrastanta kaj la malmoliĝinta pekulo sed same ankaŭ la forfaliĝinto kiu ree malantaŭen estas glitinta al sia antaŭa peka vivmaniero. Li nun alproksimiĝas al sia morto. Lia korpo eble spertas egan doloron kaj lia animo ege timas la alproksimiĝantan morton. Morto (la ostaro) estas veninta je ege neatendita kaj nedezirita tempo. La trompaj ĝuoj de peko estas forpasintaj kaj antaŭ li troviĝas terura realaĵo, nome la timegiga salajro de pekado. La viktimo de peko jam spertas antaŭsenton de la inferaj doloroj. Eĉ ke li nun ege sopiras preĝi, li ekspertas ke kuneco kun tiu Dio kies amo li tiel longan tempon malestime forpuŝis, estas fariĝinta neatingebla. Liaj amikoj de plifrue timas stari apud lia lito kaj iliaj senvaloraj konsolaĵoj ne kapablas helpi al li. Liaj riĉaĵoj---- eble malhoneste kunigitaj---- nek kapablas plilongigi lian vivon, nek savi lian animon, nek kvietigi la enaniman angoron. Li spertas

Download from www.angp-hb.co.za 




(8) LA PEREO DE PEKULO


ke estas neeble direktigi sian atenton al Dio ĉar la diablo mem tion malebligas.

Ĉio kion li plifrue amis kaj penis atingi aŭ akiri ŝajne nun primokas lin. Eĉ lia malfidela, kaj eble mem nesavita pastro, ne kapablas helpi al li, pro tio ke li estas malestiminta la favorkorecon de Dio. Li komencas konstati ke "terure estas fali en la manojn de la vivanta Dio". (Hebreoj 10 : 31) Li estas esperinta paciĝi kun Dio je iu konvena tago, eĉ sur sia mortlito sed spertas ke estas tro malfrue. Miloj da homoj subite mortas, do sen la ebleco serĉi Dion sur siaj mortlitoj. Oni do nepre serĉu Dion dum Li ankoraŭ estas trovebla. Anstataŭ la konsolajn kaj savajn vortojn de Dio, tiu ĉi mortanta pekulo kiu dumvive malestimis la diajn amon kaj korfavoron, baldaŭ aŭdos la kondamnajn vortojn de sia Juĝanto:- "For de mi, vi malbenitaj, en la eternan fajron, kiu estas preparita por la diablo kaj liaj anĝeloj" (Mateo 25 : 41). "Kaj kiel estas dekretite por homoj unufoje morti, kaj post tio juĝo......." (Hebreoj 9 : 27). Tiu kiu pli frue proponis plenan pardonon al ĉiuj kiuj tion akceptus, nun estas fariĝinta severa Juĝanto por tiuj kiuj tamen rifuzas akcepti tiun malavaran pardonon.

## BILDO LA NAŬA

Tiu ĉi bildo figurigas Kristanon kiu persistas kaj venkas ĉiajn fajre similajn atakojn kaj tentojn. Malgraŭ tentiloj ĉiuflanke, li restas firme kaj ĝisfine persistas. Pere de Jesuo Kristo li estas fariĝinta pli ol konkeranto. Li ne nur sin enskribigis por la Kristana kurkonkurso sed persistas en ĝi. Li pacience kuras rigardante nek dekstren nek maldekstren sed nur "al la aŭtoro kaj perfektiganto de la fido, Jesuo" (Hebreoj 12 : 1-2)

Download from www.angp-hb.co.za 




(9) LA KONKERANTA KORO

Download from www.angp-hb.co.za 

Satano kun ĉiuj siaj fiaj bandoj ĉirkaŭas la koron de la kredanto sed senefike klopodas lin forlogi. Troviĝas ankaŭ figuraĵoj de fiero, monamo, la malĉastecdiablo kaj aliaj. Oni nun vidas azenon anstataŭ leopardon ĉar peko ofte alproksimiĝas al ni je alia aspekto kaj ofte sin kaŝante interne de alia vestaĵo aŭ alia nomo. Sed la singardema Kristano ekrekonas pekon eĉ kiam ĝi alvenas religie alivestite aŭ en la aspekto de anĝelo de la lumo ĉar la Vorto de Dio kaj la Spirito de Vero kondukas lin en la tutan veron. Viro kun glaso da vino enmane dancetas ĉirkaŭ la Kristano klopodante tenti lin per la plezuroj de la mondo sed ne efikas je la sanktigita Kristano ĉar li estas krucumita kun Kristo rilate al peko kaj la mondo. Dua ulo per ponardo estas pikanta la Kristanon. Kalumniado, malfideleco, mokado kaj minacado pere de la malamikoj de Dio---- kaj ofte pere de laŭŝajnaj kredantoj---- daŭre estas pikantaj la koron de la vera kredanto. Sed li estas mortinta rilate al tio kion homoj diras kaj gravas ĉe li sole tio kion Dio diras. Li memoradas la Jesuajn vortojn:- "Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi. Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo" (Mateo 5 : II-I2)

Peko, la karno (tio estas la memo) kaj la diablo daŭre faras sian plejeblon por apartigi la Kristanon de la amo de Dio. Sed kun granda ĝojo kaj rokfirma fido li povas deklari, "Kiu apartigos min de la amo de Kristo? Ĉu aflikto aŭ turmento, aŭ persekutado, aŭ malsato aŭ nudeco, aŭ danĝero, aŭ glavo?" (Romanoj 8 : 35) "Sed en ĉio tio ni supervenkas per tiu, kiu nin amis" (Romanoj 8 : 37) Surmetinte la tutan armilaron de Dio, li kapablas resti stare je malbona tago kaj venki ĉiujn tentojn pere de Jesuo Kristo, kiu ĉiatempe venkis ĉiujn tentojn kaj suferojn por ke pere de Li ni kapablu venki kaj tiamaniere akiri la kronon de gloro. (ĉio laŭ Efesanoj 6 : I3-I7)

Download from www.angp-hb.co.za 

LA STELO de lia konscienco estas klara kaj brila. Lia koro estas plena da fido kaj la Sankta Spirito loĝas en li. La anĝelo supre de li (la Vorto de Dio) memorigas lin pri la alt-valoraj promesoj al tiuj kiuj venkas kaj persistas ĝis la fino. "Al la venkanto mi donos manĝi el la arbo de vivo, kiu estas en la Paradizo de Dio." "La venkanto tute ne difektiĝos de la dua morto." "Al la venkanto mi donos el la kaŝita manao, kaj mi donos al li blankan ŝtoneton, kaj sur la ŝtoneto novan nomon skribitan." "Kaj al la venkanto kaj la observanto de miaj faroj ĝis la fino mi donos aŭtoritaton super la nacioj." "La venkanto estos tiel vestita per blankaj vestoj; kaj mi ja ne elstrekos lian nomon el la libro de vivo, kaj mi konfesos lian nomon antaŭ mia Patro kaj antaŭ Liaj anĝeloj." "La venkanton mi faros kolono en la templo de mia Dio, kaj li ne plu eliros el ĝi." "Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono, kiel mi ankaŭ venkis kaj sidiĝis kun mia Patro sur Lia trono." (Apokalipso 2 : 7, II, I7, 26. Apokalipso 3 : 5, I2, 2I.)

LA MALFERMITA SAKO DA MONO montras ke ne nur lia koro sed ankaŭ lia mono estas je la dispono de Dio. Li ne malŝparas siajn terajn posedaĵojn sed subtenas malriĉulojn, donas dekonon de sia enspezo kaj aliajn nedevigajn donacojn---- eĉ sian tutan posedaĵon---- al Dio kaj ĝenerale uzas ĉion por la gloro de Dio.

LA PANO KAJ LA FIŜO signifas ke lia vivmaniero estas pura kaj modera. Li ne sin malpurigas per ebriigaj trinkaĵoj aŭ manĝante sangon aŭ premsufokaĵon nek alispecan malpuran manĝaĵon. Li ne malŝparas sian monon, nek malpurigas sian korpon (la templon de Dio) fumante aŭ maĉante tabakaĵon, nek enigas drogojn aŭ difektigajn kuracilojn. Male li manĝas sanigajn purajn nutrajn manĝaĵojn. Lia propra koro estas fariĝinta domo de preĝado. Li ankaŭ regule kaj respektplene ĉeestas ĉiujn preĝejajn kunvenojn negrave kia estus la vetero aŭ la cirkonstancoj. Li amas preĝadon, ĉu enpreĝeje, ĉu en la familia rondo, ĉu en sia propra

Download from www.angp-hb.co.za 

interna ĉambro, ĉar bone li scias ke Kristano ne kapablas ekzisti sen perpreĝa kunesto kun Dio.

LA MALFERMITA LIBRO signifas ke la Biblio estas malfermita libro ĉe li, ĉiutage li ĝin legas kaj pristudas kaj daŭre trovas saĝecon kaj fortan vivon, lumon kaj nekalkuleblajn riĉaĵojn en tio, ĝi estas fariĝinta lampo antaŭ liaj piedoj kaj glavo per kio li venkas malamikojn. Ĝi estas ĉiutaga spirita pano por lia animo, akvo por forigi lian soifon, banujo en kio sin purigi kaj spegulo per kio sin pririgardadi.

Li ĝojplene portadas la krucon ĉar bone li scias ke sen la kruco ne estos krono. Sciante ke pere de Kristo li estas releviĝinta al nova vivo, li serĉas tion kio estas supre, nome, la eternajn nevideblajn aĵojn. Li estas pretiĝinta renkonti Dion kaj estos kiel arbo, plantita apud akvaj torentoj, donanta sian frukton en sia tempo, kiel branĉo de la vera vinberarbo, kiu donas multe da frukto. Li ne konas timon je la morto ĉar plenigas lian koron la perfekta Dia Amo kiun li ricevis pere de la Sankta Spirito. Feliĉa kaj bonŝanca estas tiu kiu povas diri "Mi batalis la bonan batalon, mi finis la kuradon, mi gardis la fidon, de nun estas konservita por mi la krono de justeco" (2 Timoteo 4 : 7-8).

## BILDO LA DEKA

Jesuo diris, "Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu, kiu vivas kaj kredas al mi, por ĉiam ne mortos. (Johano II : 25-26) "Kiu aŭskultas mian vorton, kaj kredas al Tiu, kiu min sendis, tiu havas eternan vivon kaj ne venos en juĝon, sed jam pasis de morto en vivon" (Johano 5 : 24) La morto nek povas timigi nek

Download from www.angp-hb.co.za 




(IO) LA GLORPLENA HEJMENIRO

Download from www.angp-hb.co.za 

turmenti la Kristanon. "La morto forglutiĝis en venko. Ho morto, kie estas via venko? Ho morto, kie estas via pikilo?..........
....danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per nia Sinjoro Jesuo Kristo" (I Korintanoj I5 : 54-57)

Persono kiu estas vivinta kaj irinta kun Dio, ne timas la morton. Kiam alvenos la tempo de lia foriro, li ĝojplene iros---- aŭ laŭ la priskribo de la Apostolo Paŭlo:- "....havante deziron foriri kaj esti kun Kristo, kio estas multe pli bona" (Filipianoj I : 23)

Kristano sopiregas rigardi la vizaĝon de Jesuo kiu lin estas savinta per Sia surkruca morto. La Sankta Spirito ankaŭ memorigas lin al la Jesuaj vortoj "ne maltrankviliĝu via koro; vi kredas al Dio, kredu ankaŭ al mi. Ĉe la domo de mia Patro estas multe da loĝejoj........mi revenos kaj ricevos vin al mi mem, por ke vi ankaŭ estu tie kie mi estas" (Johano I4 : I-4) "Okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas" (I Kor. 2 : 9) Ne ekzistas taŭga terana lingvo per kio oni kapablas klarigi kaj priskribi la gloron de la enĉielaj loĝejoj preparitaj por tiuj kiuj ĉi tie surtere iradis laŭ la piedsignaro de nia Sinjoro Jesuo Kristo.

Anstataŭ la timigan ostaron (morton) oni ĉilastabilde vidas la anĝelon aŭ senditon de Dio. Li estas atendanta revenigi la justigitan spiriton al Dio. Animo kaj spirito estas liberigataj de la mortideva korpo kaj suprenŝvebas tra la jam malfermigitaj ĉielaj pordegoj al Tiu Kiun lia animo estas aminta kaj por kiu li estas vivinta kaj mortinta surtere. Ĝojega bonvenigo lin atendas en la ĉeesto de Dio kie lia Sinjoro kaj Mastro lin salutas per "Bone, vi bona kaj fidela servisto......
...envenu en la ĝojon de via sinjoro" (Mateo 25 : 2I)
Satano ne plu havas potencon super li ĉar "grandvalora en la

okuloj de la Eternulo estas la morto de Liaj fideluloj" (Psalmo II6 : I5). "Kaj mi aŭdis voĉon el la ĉielo, dirantan: Skribu: Feliĉaj estas la mortintoj, kiuj de nun mortas en la Sinjoro; vere, diras la Spirito, por ke ili ripozu de siaj laboroj; ĉar iliaj faroj sekvas kun ili" (Apokalipso I4 : I3)

## LASTA ADMONO

Kara leginto. Dio helpu al vi transdoni vian koron al Tiu kiu vin amas ĉar ĝuste nun Li petegas vin, dirante "Donu, mia filo (mia filino) vian koron al mi" (Sentencoj 23 : 26) Transdonu al Jesuo vian laciĝintan, ĉagreniĝintan dolorplenan koron kaj Li metos novan koron kaj novan spiriton interne de vi. Ne estu trompata de via trompema propra koro kiu instigas vin plenumi siajn fiajn dezirojn ĉar "kiu fidas sin mem, tiu estas malsaĝa; sed kiu tenas sin prudente, tiu estos savita" (Sentencoj 28 : 26). Forlasu vian pekadon kaj algluîĝu al justeco "ĉar la salajro de peko estas morto; sed la donaco de Dio estas eterna vivo en Kristo Jesuo, nia Sinjoro" (Romanoj 6 : 23)

Kaj vi kiu estas transdoninta vian vivon al Dio "konservu la modelon de sanaj vortoj, kiujn vi aŭdis de mi, en fido kaj amo, kiuj estas en Kristo Jesuo" (2 Timoteo I : I3) kaj pro la sama kialo Paŭlo deklaris en 2 Timoteo I : I2 "ĉar mi konas tiun, al kiu mi kredis, kaj mi konvinkiĝis ke Li havas la povon gardi mian konfiditaĵon ĝis tiu tago". Konstruiĝu en la plej sankta fido, preĝu en la Sankta Spirito, restu en la amo de Dio, alrigardante Jesuon, la Vojon, la Veron kaj la Vivon, nian Sinjoron, kiu "estante Sinjoro de la sinjoroj kaj Reĝo de la reĝoj", baldaŭ revenos por ricevi Sian propraĵon.

"Kaj al Tiu, kiu povas vin gardi senfalaj, kaj starigi

Download from www.angp-hb.co.za 

vin senriproĉaj antaŭ Sia gloro en granda ĝojo, al la sola Dio, nia Savanto per Jesuo Kristo, nia Sinjoro, estu gloro, majesto, potenco, kaj aŭtoritato, antaŭ ĉiu mondaĝo, kaj nun, kaj ĝis la eterneco. Amen." (Judas 24, 25)

Download from www.angp-hb.co.za 

This booklet "The Heart of Man" is available in 200 languages and dialects spoken throughout the world (Africa, America, Asia, Australasia, British Isles, Europe, Far East, Greenland, Scandinavia, etc.).

The 10 heart pictures contained in this booklet are also available in the form of large coloured picture charts (86 x 61 cm) bound together in a set of 10 pictures. These "Heart Charts" can be obtained with European or African features and are particularly suitable to be used in conjuction with the Heart Book for class-teaching, open air evangelisation, etc.

---

You are welcome to contact us for arrangements concerning new translations of our literature. Your assistance would be appreciated.

If you have found salvation in Christ, or have been otherwise blessed through our Gospel literature, please let us know. We would like to thank God with you and remember you further in our prayers.

---

*For Gospel literature, books and free Gospel tracts in 200 languages, write to:*

**ALL NATIONS GOSPEL PUBLISHERS**
**P.O. BOX 2191, PRETORIA, 0001, R.S.A.**

(A Gospel Literature Mission Financed by donations)

*Printed by Roodepoort Mission Press*

## A SPECIAL WORD FROM ANGP

## UN MONDE SPÉCIAL DE L'ANGP

## UMA PALAVRA SPECIAL DA ANGP

**This booklet "The Heart of Man" is available in over 538 languages and dialects spoken throughout the world (Africa, Asia, The Far East, South America, Europe, etc.) Our Heart Book is now also available on cell phones, tablets, etc from www.angp-hb.co.za.**

**Le livre du "Coeur de l'homme" peut etre obtenu en plus de 538 langues et dialectes parles dans le monde entier, a savoir: Afrique, Amerique, Asie, Extreme Orient, Europe. Notre Livre du Coeur est maintenant aussi disponible sur votre Telephone cellular, plaques, etc. de www.angp-hb.co.za .**

**Este livro "O Coracao do Homem" e obtfdo em mais de 538 linguas e dialectos falados em todo o mundo, a saber: (Africa, Asia, America do Sul, Extremo Oriente, Europa, etc). O nosso Livro O Coração do Homem tambem esta agora disponivel em telefone celular, tablets, etc. de www.angp-hb.co.za**

The 10 heart pictures contained in this booklet are also available in the form of large coloured picture charts (86 x 61cm) bound together in a set of 10 pictures. These "Heart Charts" can be obtained with European or African features and are particularly suitable to be used in conjunction with the Heart Book for class- teaching, open air evangelization etc. Kindly contact us to ascertain the latest subsidized price of this chart.

Les 10 images du coeur qui figurent dans ce livre peuvent etre obtenues en tableaux de couleur, format 86 x 61 cm, avec des physionomies europeennes ou africaines. Ils peuvent etre utilises en meme temps que le livre du coeur pour des classes bibliques, a l'ecole du dimanche ou lors de reunions de plein air. Soyez aimable de nous contacter pour assurer les derniers prix en cours du tableau.

As 10 imagens do coracao, contidas neste livro podem ser obtidas num conjunto de 10 imagens em colorido no tamanho de (86 x 61 cm). Estes "Cartazes do Coracao podem ser obtfdos com caracterfsticas Europeias e Africanas e podem ser usados em conjuncao com o mesmo livro em classes de ensino biblico, evangelizacao ou ao ar livre. Agradeciamos que nos contacta- se para confirmacao do ultimo preco dos cartazes.



Kindly write to us if you are able to assist us with further translations of our free Gospel literature, informing us of the language into which you could translate this Gospel literature. Your assistance would be appreciated.

If you have found salvation in Christ, or have been otherwise blessed through our Gospel literature, please let us know. We would like to thank God with you, and remember you further in our prayers.

Nous vous invitons a nous contacter pour faire des arrangements concernant de nouvelles traductions de notre litterature, nous informant de la langue dans laquelle vous pouvez traduire cette litterature evangelique. Votre aide sera beaucoup appreciee.

Si vous avez trouve le salut en Christ ou si vous avez ete beni par notre litterature, nous vous prions de nous le faire savoir. Nous aimerions remercier Dieu avec vous et prier pour vous.

Nos vos convidamos a nos contactar, afim de fazer qualquer arranjo concernente a novas traducoes de nossa literatura em outras lfnguas. Vossa assistencia sera muito apreciavel.

**Se tem encontrado a salvacao em Cristo, ou se tem sido abencoado por intermedio da nossa literatura evangelica, faca o favor de nos informar. Pois nos gostarfamos de agradecer a Deus juntamente convosco, e lembra-lo sempre em nossas oracoes.**

**For free Gospel literature, books and tracts in over 538 languages, write to:**

**Pour obtenir gratuitement de la litterature evangelique, des livres et des traites en plus de 538 langues, ecrivez a:**

**Para obter gratuftamente a literatura evangelica, livros e folhetos em mais de 538 lfnguas diferentes escreva para:**


**E-MAIL: info@angp.co.za**

ALL NATIONS GOSPEL PUBLISHERS
PO BOX 2191
PRETORIA
0001
R.S.A.


**A Gospel Literature Mission financed by donations**
**Une Mission de litterature evangelique financee de dons**
**Missao de literatura Evanqelica financiada por donativos**


**(Reg. No. 1961/001798/08**